AVENO #46 - **Homaj Rajtoj kaj Respondecoj – 2020**

Ghenerala rimarko: pluraj informoj alvenas kun peticio - kompreneble plej multaj el ili ne plu estas aktivaj. Do, bonvolu kontroli la daton, se vi intencas subskribi ian ajn peticion.

Se vi serchas ion chi-sube: kutime mi uzas la literumadon pere de „h“: ch, … sh + u. Ligoj:

Socio de Verduloj Esperantistaj (AVE): www.verduloj.org , novaj artikoloj je la enirpagho, aliaj sub "Dokumentoj“

Homaj Rajtoj (1947): eo.wikipedia.org/wiki/Universala_Deklaracio_de_Homaj_Rajtoj

Lingvaj Rajtoj = Homaj Rajtoj: www.linguistic-rights.org/

Tutmondaj Mondcivitanaj Teritorioj: www.recim.org/dem/tcm-list.htm

Rajto de memdetermino: eo.wikipedia.org/wiki/Rajto_de_memdetermino

Homaj Respondecoj (1997):
eo.wikipedia.org/wiki/Universala_Deklaracio_de_Homaj_Respondecoj

la dokumento en la angla, kiu ligas al tradukoj en ch. 40 lingvoj:

www.interactioncouncil.org/publications/universal-declaration-human-responsibilities

= = = =

2020-12-26 Putin timas la veron - donis al si mem imunecon.

la teamo de Alexej Nawalny serchis kaj trovis la grupon de specialistoj kiuj delonge klopodis mortigi lin - ekzemple per milito-veneno Novychok. Li publikigis telefonan interparolon kun unu el tiu grupo kiu rakontis (opiniante ke li parolas kun sam-teamano). Kompreneble la rusa prezidento Putin komunikis ke tio estas falsigajho - tamen, kiu kredas tion ? Putin mensogis tro ofte.

Kunlaborantino de Nawalny, Ljubow Sobol, estis malliberigita kiam shi volis viziti unu el tiuj specialistoj.

Kiam Nawalny montris la vivdangheran shokon, la aviadilo flugis malsupren al la plej proksima flughaveno; aliflanke Nawalny alvenintus morta en Moskvo.

Aliflanke la sama rusa prezidento jhus subskribis legon ke aktivaj kaj eks-prezidentoj kun la familianoj estos protektitaj de jura imuneco - same kiel parlamentanoj. Honesta persono ne bezonas tian baron chirkau si.

https://www.tagesschau.de/ausland/strafverfahren-gegen-nawalny-vertraute-101.html

https://www.tagesschau.de/ausland/nawalny-giftanschlag-agent-101.html

https://www.tagesschau.de/ausland/putin-immunitaet-103.html

= =

2020-11-22 Pri egoismaj politikistoj - **regantoj de la jenaj landoj chagrenas min/nin:**

Pollando kaj Hungario - ili prenas gigantajn sumojn de EU, sed ne respektas la bazajn demokratiajn regulojn;

Usono - Trump - nekredeble kiom impertinenta li estas, kaj ke tiom da fanoj/shatantoj tamen subtenas lin;

Irano, Saudi-Arabio, Israelo - ili ne sukcesas kunsidi kaj trovi komunan solvon de la regiona problemo (pri Palestenanoj kaj Jemeno, ...);

Venezuela k.a. kie ne-taugaj regantoj ne pretas cedi, sed preferas ruinigi la tutan landon;

Belarusio kaj Rusio - sen Putin la vasalo Lukashenko ne povus resti - li falsigis la elektojn, sed tio ne estas problemo por Putin - bedaurinde; Putin nebuligas/vualigas la provojn murdi opoziciulojn i.a. pere de nerva veneno Novychok (plej laste Alexej Nawalny).

Chinio - etendadas sian maran teritorion (por havigi al si la resursojn), faras modernan formon de kolonialismo, malrespektas autonomion de tibetoj, ujguroj kaj mongoloj, kaj ne akceptas diversajn religiojn;

Brazilo, kaj pluraj aliaj plene malrespektas la rajton de la biosfero ... multaj aliaj landoj ne sufiche respektas la naturon.

Tio ne estas chiuj registaroj - sed sufichas por nun.

= =

2020-11-07 fino de trumpa-ludado - venko de demokratio

oni ne kredus ke usona prezidento agas kiel faris la nuna *trump* - kaj ne imagus ke lia partio akceptus tian fi-ludadon.

Ni ne atendas ke Joe Biden estas anghelo, chiukaze li agas honeste, kaj lia vic-prezidentino Kamala Harris espereble helpos al pli sociala politiko. Jen du ligiloj en la germana:

Jen la unua parolo de Biden: https://www.tagesschau.de/ausland/uswahl2020/uswahl2020-biden-harris-rede-101.html

Jen pri s-ino Harris: https://www.tagesschau.de/ausland/uswahl2020/uswahl2020-harris-101.html

- -

2020-11-04 Respekti viv-manieron de indighenoj, alia maniero ne taugas por ili.

5-minuta filmo, subtitolita en Esperanto:

http://www.wapikoni.ca/movies/qilliqtu-shiny-object#lid=ed158144-4504-4245-aa24-8c399c115b19&videotype=vimeo
Eble vi sciiug pri tiu (kaj aliaj filmetoj) en via informilo.
Fonto (kun la aliaj filmetoj) troveblas sur **wapikon.ca**
**Jen alia pagharo pri tutmonde interesaj aktualajhoj - en Esperanto: https://eo.globalvoices.org/about/**

Pri Paco: https://www.vrede.be/eo
Ankorau ekzistas: https://eo.mondediplo.com/

Kun amikaj salutoj, Herman Dekeŭnink

= =

2020-10-21 Tutmonda kontrakto pri malpermeso de atombomboj aktivos

Post Honduras, kiel 50a shtato, ratifis chi-tiun kontrakton de 122 shtatoj, ghi estos valida post 90 tagoj.

Bedaurinde tio ne signifas ke la aliaj shtatoj (ch. 70) kiuj ne subskribis la kontrakton: Usono, Rusio, Chinio, Hindio, Pakistano, Norda Koreio ech Japanio, k.t.p. devas malmunti siajn atimarmilojn; sed estas pli bona kontrolo kaj rimedoj bremsi la proliferadon (distribuon).

En Germanio estas 170 parlamentanoj, krome landoj kaj urboj, kaj multaj civitanoj, kiuj postulas la ratifon de tiu Traktato. Lau informoj de ICAN-Germanio tiu ratifo ne kontrauas esti membro de NATO. Jen la informo en la germana:

https://www.icanw.de/wp-content/uploads/2020/10/20-10-23_AVV_Inkrafttreten.pdf

Jen la internacia pagho: https://www.icanw.org

Jen la informo de Colette kaj André Weiss (Progresemaj Esperantistoj):

Honduro estas la kvindeka ŝtato kiu ratifis la "Traktaton pri la malpermeso de nukleaj armiloj".
Laŭ la dek kvina artikolo de tiu Traktato, tiu ĉi validiĝos post 90 tagoj.

Estiel francaj civitanoj, hodiaŭ ni sendas leteron al la franca respublika Prezidento. (vidu la almetitan dokumenton).
En Eŭropa Unio nur kvin ŝtatoj ratifis la Traktaton : Aŭstrio, Irlando, Malto, San-Marino, Vatikano. Tiuj kvin ŝtatoj ne estas membroj de NATO.

**Sur la tero estas 13 865 atombomboj.**

= =

2020-10-10  Internacia Tago kontrau la Mortpuno

en 135 de 197 shtatoj ne plu okazas mortpuno.

Sed en 55 ankorau estas lau-leghe, ofte pro islama legho. Malmultaj demokrataj shtatoj uzas chi-tiun ekstreman punon.

La vikipedia artikolo en Esperanto ne montras la shtatojn, sed la principojn surbaze oni mort-punas.

- -

2020-09-14  Opozicio ricevas bonajn rezultojn en Tomsk

En Tomsk kaj Nowosibirsk pluraj homoj ricevas seghon el la listo kiun kunmetis la kunordigado-grupo de A. Nawalny.

Tio estas sukceso de sendependa opozicio, kiu uzis la „saghan vochdonadon“ - do, elekti komune la personojn kiuj havas shancon reprezenti la opozicion. Sen tia kunagado estus multe pli da kandidatoj - tiam neniu el ili havas shancon.

„Golos“ la sendependa rusa organizajho kiu rigardas-kontrolas la balotojn, kritikis ke okazis multaj ne-regulajhoj; fraudoj ech pli facilis, char la baloto okazis dum 3 tagoj. Ech la oficialaj komisionoj konfirmis tiajn, sed diris ke estis nur „malgrandaj eraroj“.

tagesschau.de/ausland/russland-regionalwahl-107.html

Komento AVE/mw: Rusio estas survoje al demokratio.

= =

2020-09-08  P.R.Chinio malrespektas siajn minoritatojn, ktp.

jam en Tibeto la registaro malrespektis la rajton de minoritato al sia propra lingvo; nen lernejoj kaj kontrau loka kaj regiona administracio;

en orienta Turkestan (XinJiang) la registaro malliberigas homojn por cerbo-lavado;

kaj nun plendas la mongoloj en sia t.n. autonoma provinco Nej Mangu (Interna Mongolio) ke edukado al ilia lingvo estas reduktita.

tagesschau.de/ausland/china-mongolische-sprache-101.html

Alia temo estas la agresemo de la registaro kontrau najbaraj landoj: Bhutan, Hindio, oceanaj najbaroj, kaj finfine Australio (chi- tie pro homaj rajtoj (de jhurnalistino) kaj pro la deziro de Australio ekscii de la china registaro iomete pli pri la komenco de tiu kronvirusa epidemio).

tagesschau.de/ausland/australien-journalisten-china-101.html

Komento de AVE/mw:

Kiam P.R.Chinio estis evoluighanta lando kun multaj politikaj provoj, mi havis grandan simpation por Chinio; regule legis „El Popola Chinio“, vizitis ghin en 2000, kaj en 2004 la UK-on en Pekino.

Nun tiu giganta lando pli kaj pli ighas imperialisma, kaj en internaj rilatoj (kontrau minoritatoj kaj religioj) kaj en eksteraj (kolonialismo,alpropriigo de maraj regionoj) - bedaurinde.

- -

2020-09-08  Rusio - sistema venenigo kiel politika metodo - premoj je regionaj elektoj - korupteco

Intertempe oni esploris ke Nawalny estis venenigita pere de Novichok-a veneno (unu plia suferanto

de tiu metodo elshalti „homon kiu kauzas problemojn“). Tiaj kemiaj armiloj estas internacie malpermesitaj.

La ridinda maniero de la rusa prezidento kaj sia administracio montras ke ili ne interesighas pri la vero - au pli bone: ne hontas pri tio kion ili kauzis.

Same Putin - laudire unu el la plej richaj homoj - ne sentas problemon gratuli la belarusian prezidenton al reelekti, malgrau tio ke tiu estis rikolto de fraudego (balotokampanjo kaj vochdonado ne estis sub neutrala kontrolo). Mi admiras la civitanojn kiuj delonge manifestacias por travidebla kaj honesta politiko, plejparte tion kuraghas virinoj, en Minsk (ktp) kaj ankau en Hhabarovsk (Siberio), kie temas pri korupteco.

Gor-seti (urbaj retoj) estis ne nur privatigitaj sed en pluraj rusaj urboj apartenas al homoj de la nova Nomenklatura (membroj de Putina partio), kaj postulas pli altajn pagojn de la administracio, influataj de ili mem.

deutschlandfunk.de/fall-nawalny-uno-menschenrechtskommissarin-fordert-russland.1939.de.html?drn:news_id=1170580

= =

2020-08-09  Belarusio ankorau ne elektis prezidenton

la reganta prezidento asertas ke li gajnis la elekton (la 6an fojon; lau liaj kunuloj li ricevis 80%, dum la plej grava kun alia kandidatino ricevis 7%) - amasaj protest-manifestacioj. Ghis nun mankas oficiala rezulto.

Bedaurinde la baloto ne estis sub neutrala internacia kontrolo. Tion oni ne nomas elekton sed uzurpon. Kial li ne simple rezignis pri la baloto - dirunte mi restas via bona diktatoro. Vi ne bezonas elekti, kaj ni shparas la monon.

AVE esperas ke UN kaj alilandaj prezidentoj ne akceptas chi-tiun farson, postulas komplete novan baloton sub egalecaj kondichoj kaj sub travidebla internacia kontrolo, liberigon de politike malliberigitaj personoj.

(germana TV): www.tagesschau.de/ausland/belarus-praesidentenwahl-lukaschenko-103.html

= =

2020-07-14  Informighi - fini chiujn militojn

jen interesa retejo de (chefe usonaj) pacifistoj, plejparte tradukita en multajn lingvojn, inter ili Esperanto:

Mi subskribis ilian peticion - chi-foje pri malbonaj sekvoj de militaraj ekzercado en Pacifiko.

worldbeyondwar.org/eo/pac-reto-diras%2C-ke-rimpac-militaj-ludoj-ekspluatas-pacajn-popolojn/

(dankon al Janek por la informo)

= =

2020-07-03  Korupto en EUropo - ekzemplo Hungara kleptokratio

Beobachter und Betroffene sind sich in ihrer Einschätzung einig: Seit dem Amtsantritt der Orban-Regierung im Jahr 2010 wurden die EU-Zahlungen an das Land regelrecht geplündert. Die Überweisungen aus Brüssel wurden genutzt, um die eigene Machtstellung zu zementieren und massiv Gelder in die eigenen Taschen zu stecken. Dafür werden ausgeklügelte Firmen-Konstrukte genutzt, öffentliche Ausschreibungen werden systematisch manipuliert. Kritiker*innen und Whistleblower*innen werden mit Mafia-Methoden eingeschüchtert, bestraft und zum Schweigen gebracht. Im Land herrscht eine Mischung aus Angst und Apathie.

Das System Orban hat den ungarischen Staat und die Wirtschaft unterwandert. Ungarische und Europäische Gelder werden systematisch geklaut. Orbans Familie und engste Freunde wurden in kürzester Zeit unfassbar reich.

**Keine neuen EU-Gelder ohne Kontrolle**

Die Europäische Union verhandelt aktuell den größten EU-Haushalt überhaupt und schnürt mit

Wiederaufbau-Fonds ein Milliardenpaket, um den Folgen der Corona-Krise zu begegnen. Würde die EU diese Hilfsgelder an die Regierung in Budapest überweisen, würde davon wenig bei denen ankommen, die in dieser Krise Hilfe und Unterstützung benötigen.

Die Corona-Krisen-Gelder dürfen aber auf keinen Fall Orbans Vater, seine Tochter, seine Schulfreunde noch reicher machen. Sie dürfen nicht in völlig sinnloses Projekten verschwinden, wie die, die ich in den letzten Tagen in Orbans Geburtsort gesehen habe: die Orban-Bahn ins Nirgendwo, das Geisterstadion oder der königliche Landsitz/Golfplatz der jetzt Orbans Vater gehört.

(lau info de Daniel Freund, MEP Verduloj/Reginalistoj - Mardo 7a de Julio 2020 - diskuto (en la angla) kune kun EU-prokuratorino Koevesi, brita jhurnalistino Hopkins kaj chehha senatoro Wagenknecht): vi povas alighi al la zoom-prezentado:
news.danielfreund.eu/sites/all/modules/civicrm/extern/url.php?u=540&qid=191987

= =

2047-06-30 PR Chinio: unu lando - unu sistemo

PR Chinio progreseme saltis en la jaron 2047 - au eble resaltis al 1984 ?

1997 GB redonis Honkongon al PR Chinio - oni interkonsentis ke validos la regulo: unu lando - du sistemoj dum 50 jaroj.

Sed nun la imperatoro (fakte la marioneteca Popola Kongreso) decidis ne atendi tiom longe, char la simplaj homoj sur tiuj insuletoj tro postulis restigi la kulturon de autonomio kaj malfermeco.

- -

2020-06 PR Chinio: unu lando - unu etno ?

En la granda lando PR Chinio loghas ch. 50 diversaj etnoj (kelkaj grandaj, kaj multaj etaj etnoj). Krom la han-plejmulto (han-etno) ekzistas grandaj etnoj de tibetanoj, ujguroj kaj mongoloj - chu mi forgesis ajnan grandan etnon kiu havas pli ol miliono da homoj ? Chiukaze la sistemo (registaro) ne toleras ke aliaj grandaj etnoj vivu lau sia kulturo kaj kredo. Tibetanoj chefe servas por turisma bunteco, dum la granda Tibeto servas kiel trezorejo (ercoj, akvo-energio, nutrajhoj). Nun tempe la ujguroj estas subpremataj (milionoj estas malliberigitaj en gulagoj (por cerbo-lavado); mi jhus audis ke virinoj estas sterilizitaj; la han-etno pli kaj pli difuzas en la grandan ujguran terenon por pli bone kontroli tiun etnon. Simile okazis dum Sovet-Unio kie rusoj estis setligitaj en la diversaj provincoj de Baltio kaj Centra Azio.

Adrian Zenz - lau informo de Jamestown Foundation (usona Penso-firmao / Thinktank en Washington, D.C. ) - taksas la agadon de la china registaro demografan genocidon.

Jen informo pri tia politiko kontrau ujguroj en la t.n. autonoma provinco XinJiang:
www.tagesschau.de/ausland/uiguren-china-109.html

www.tagesschau.de/investigativ/ndr/china-cables-uiguren-101.html

www.de.wikipedia.org/wiki/Xinjiang-Konflikt

Komento mw: Simile planis - kaj ech pli terure faris - la nazia Hitlera-reghimo de Germanio.

- -

2020-06 TEJO lanĉas du novajn projektojn en 2020 kunlabore kun la Konsilio de Eŭropo

**Centro de Edukistoj pri Homaj Rajtoj: estu aktoro de ŝanĝo!**

Ĉi tiu projekto estas kunfinancata de la Junulara Fako de la Konsilio de Eŭropo kaj estas en la kadro de la programo “Junularo por Demokratio” de la Konsilio de Eŭropo 2020-2021. Ĝi celas subteni kaj/aŭ kunfinancigi naciajn aŭ regionajn projektojn por efektivigo de la Ĉarto de la Konsilio de Eŭropo pri Edukado por Demokratia Civitaneco kaj Homaj Rajtoj (EDC/HRE) per trejnado de trejnistoj kaj multiplikantoj neformalaj. lernado kaj junulara laboro. La fokusoj de la subtenataj

iniciatoj en 2020 estos subteni junulojn en aliro al iliaj rajtoj kaj rekomendi edukadon por homaj rajtoj kaj demokratio. Sekvu che TEJO.org

= =

2020-05-30 malpermesi atombombojn tutmonde

ICANW.org estas la tutmonda organizo por la abolicio de atomarmiloj. Namibia estas la 36-a lando kiu ratifis la TBNW (kontrakto malpermesi atombombojn). Kiam 50 shtatoj estos ratifintaj ghin, ghi ighos tutmonda legho. Bedaurinde la registaroj de la nunaj atombombaj shtatoj ne emas fini tiun tutmondan minacon. Se tia milito okazus – ekzemple per stulta hazardo - tiam nia tutmonda civilizo ricevos gigantan baton. La esperant-lingvaj verkistoj kreis plurajn librojn pri la temo atom-milito; komence de Hiroshimo kaj Nagasaki – kaj ekz-e montrante per fikcio kio okazus je grandskala atommilito. Temas pri „Tragedio en la Universo“ de la Kroata Esperanto Asocio 1961.

Por ekscii kion vi povas fari en via propra lando, bonvolu trovi la ligilon en: ICAN.org/partners

= =

2020-05-10 Rusio bombas civilulojn lernantojn, malsanulejojn per botel-bomboj kaj bombeto-obuso

Amnestio Internacia plendis ke Rusio dum la civila milito en Sirio la registaro subtenas per maniero kiu estas kontrau internaciaj kontraktoj kiel Milita Juro (deklaracio de Den Haag), Konvencioj de Ghenevo. Lau tiuj deklaracioj oni ne rajtas bombi civilajn personojn, lernejojn, malsanulejojn, ktp., kaj multaj shtato akceptis gheneralan malpermeson jheti grapolbombojn (vidu en eo.wikipedia.org) au meti kontrau-personajn minojn kiuj daure atakados civilajn personojn: aparte kamparanojn kaj ludantajn infanojn.

AI plendis montrante multajn pruvojn ke en Sirio oni sisteme atakas mal-leghe, kaj ke Rusio rekte partoprenas en tia agado.

Jen ligiloj en la germana kaj de tutmonda AI en la angla, araba, franca kaj hispana:

www.amnesty.de/allgemein/pressemitteilung/syrien-syrien-gezielte-angriffe-auf-krankenhaeuser-und-schulen

www.amnesty.org/en/latest/news/2020/05/syria-un-must-not-cut-vital-aid-lifeline-to-north-west-amid-russian-and-syrian-war-crimes/

= =

*necesas trovi partnerajn urbojn en Pollando kiu kontrauas akcepti LGPT+*

2020-04-27 peticio por respekti HR por LGPT+ paroj en polaj ghemel-urboj

Partner cities around the world have long-running relationships with their Polish counterparts. They constantly engage in cultural exchange, visits, and mutual support. If they ask their partners to respect the rights of their LGBT+ citizens, their messages will be heard.

Retejo en 5 lingvoj: de, en, es, fr, it) : action.allout.org/en/a/to-poland-with-love/

= ==

2020-03-20 Mortpuno en Hindio/Barato – sociala reformo cele al plenaj homaj rajtoj necesas

Eble vi ankau legis ke finfine oni plenumis la mortpunon kontrau 4 (el 6) junaj viroj kiuj komune kaj ege kruele seksperfortis studentinon en Hindio. La familio ghojis pri tio.

(jen informo en la germana televido: www.tagesschau.de/ausland/neu-delhi-hinrichtung-101.html )

Komento AVE/mw:

Sed evidentas ke la sociala sistemo kaj tradicio en Hindio nepre bezonas reformon, kiu egaligas la valoron de filinoj rilate al filoj. La sistemo de geedzigho (kiu estas multekosta por la gepatroj de filino) eble ankau kauzis la abortigon de ina fetuso pro sociaj kauzoj. El tio rezultas malegaleco inter la nombro da inoj kaj ichoj (viroj) en la populacio. La edukado de junaj virichoj ne gvidas ilin al plena respekto kontrau virinoj. Certe la situacio estas pli kompleksa.

Ankau la klopodo shanghi la konstitucion rilate de hindua naciplimulto kontrau aliaj religioj – aparte

islamo - rezultas en malamo en la socio. Neniu religio posedas la plenan veron pri la spirita sfero de la homara socio por si mem.

- -

2020-03-23  Mortpuno aboliciita en Kolorado, Usono

Governor Jared Polis subskribis la komuna interkonsento de la parlamento kiu havas majoritaton de Demokratoj.  La mortpuno de 3 punitaj estis shanghita al dum-viva mallibereco. La diskuto komencis en la jaro 2007.  Adrienne Benavidez, unu el la aktivistoj en la parlamento, diris ke tiel finas „diskriminado, ne pro la haut-koloro, sed pro regiona deveno“.  Eble iu el niaj usonaj membroj povas klarigi la signifon de tiu frazo.

Mi rememoras al nia samideano N.I. Sequoya, kiu vivas (?) sub strange ricevita mortpuno en kalifornia malliberejo.  (informo de usona organizajho kiu klopodas fini la mortpunon: ncdap.org)

- - -

2020-02  Modela kunlaboro inter ambau partoj de Kiprio

sur la dispartigita insulo Kipro, jen la projekto «olivoleo por la paco» 11/02/2020 Tiuj olivarbejoj ignoras la demarkacilinion en Kipro, por projekto fondita sur amikeco. Aleksandros estas greka kiprano, Hasan estas turka kiprano.

Dankon al Kurt kaj Janek – ligilo:  www.neniammilitointerni.over-blog.com/

tutmondaj sindikatanoj: www.www.labourstart.org/news/index2019.php?langcode=eo

= = =

2020-01-31  Trump ordonas denove meti grund-minojn (eksplodiloj kontrau personoj)

Ni scias ke tiaj minoj jam nun dekoj da jaroj post la metado vundigas, kripligas kaj mortigas civilulojn, tre ofte infanojn. Ili estas malpermesitaj dank al la kontrakto de Ottawa de 1997, kiu ighis valida en 1999 post la ratifo de 40 shtatoj. Intertempe tiu kontrakto ghis 2018 estis ratifita de 164 shtatoj (vidu che Vikipedio).

La antaua usona prezidento Obama akceptis la kontrakton, kaj malpermesis meti (sterni) grund-minojn, sed Usono ne ratifis ghin.

Unter den rund 36 Staaten, die zu diesem Zeitpunkt nicht beigetreten waren, befinden sich unter anderem Ägypten, China, Indien, Iran, Israel, Nordkorea, Pakistan, Russland, Südkorea, Syrien, Saudi-Arabien und die USA.

= =

2020-01-30  Trump-a pac-plano gvidos al malpaco

la usona prezidento prezentis „pac-planon por Proksiman Orienton“ Israelo kaj Palesteno. Li diskutis kun kelkaj geamikoj, sed ne kun reprezentantoj de palestenanoj.

Chiu-tiu plano fiksus la aktualan mapon, reduktus la terenon de Palesteno al Gaza-strio kaj malgranda svisa fromagho okcidente de Jordan-rivero (la valo de tiu rivero ighu israela posedajho), kaj krome decidis ke Jerusalemo entute estos la chefurbo de Israelo, malgrau tio ke Palestenanoj en orienta Jerusalemo havas sian chefurbon. Krome la alia posteularo de Abraham (la araboj) delonge same uzas sanktajn lokojn en Jerusalemo – la pacon en tiu sankta regiono por la tri religioj gardu la regho de Jordanio.

Ghis nun – ekde 1948 - vivas ch. 5 milionoj da forpelitaj palestenaj rifughintoj kun siaj posteuloj en proksimaj kampadejoj. Trump proponis ke ili au setlighu ene de la estonta Palesteno (jam tre loghata tereno), au restu kaj intergrighu en chi-tiu lando kie ili nun vivas, au setlighu en iun ajn alian landon. Tio estas delonge la deklarita politiko de Israelo – kiun mi persone audis antau ch. 10 jaroj de reprezentanto de KKL.

La sola interesa ideo estas la tunelo inter Gaza kaj Okcidenta Bordo, chu Usono pagos la tunelon. Trump promesis 50 miljardojn USD por evolui Palestenon ? Kaj li promesis duoble grandan terenon ol tiu de la israelaj setlejoj – se mi bone komprenis je la rando de la dezerto Negev (kiun

Israelo pretendas post 1967).

la palestenanoj diris ke ili ne akceptos chi-tiun planon de Trump. Multaj gravuloj kritikis ghin. Postmorgau la Araba Ligo diskutos pri chi-tiu plano – espereble ili trovos interkonsenton.

Komento de AVE/mw:  mi esperas ke mi ne faris tro multajn erarojn pri tiu ege komplika situacio kaj „simpla“ plano. Pli bone estus komuna shtato kun samaj rajtoj al chiuj.

= =

2020-01  Falanta chielo – profetajho de Davi Kopenawa Ianomami
Davi Kopenawa Yanomami estas shamano kaj organizis la plurjaran kampanjon por sekurigi la rajtojn je propra lando de la Janomami en Amazonio.  Viu pli je #StopBrazilsGenozid
Lia organizo Hutukara Associação Yanomami 2019 ricevis la t.n. Alternativan Nobel-Premion, nome „Right Livelihood Award“, char ili kuraghe protektas la biodiversecon, landon kaj kulturon de la inidghenoj de Amazonio.  Jam1989 chi-tiun premion ricevis CSO „Survival International“ kiu tutmonde defendas la rajtojn de indighenaj komunumoj – kiun li akceptis kiel reprezentanto de SI.

Kaj jen plia informo de Alvaro Motta:
Kara Manfred, la ianomama brazila indigheno David Kopenawa, gajninto de la alternativa Pac' Nobel Premio, publikigis libron en 2015, kiu nomighas "La Falo de'l Chielo".
La titolo bazighas sur averto farita de janomama shamano pri la damaghoj de la homa poluo al la atmosfero. La brazila poeto kaj muzikisto Eliakin Rufino komponis poste la muzikon "La songho de'l Shamano" en la portugala. Sylla Chaves tradukis ghin Esperanten kaj Neide Barros interpretis ghin. Jen la versio Esperanta:  https://youtu.be/sqFPZoVAIyA

= =

2019-12-21  Homa populacio kreskis ghis 7,75 miliardoj – akridoj/ortopteroj montras la dangheron

Chefe en Afriko sude de Saharo. Tio kauzas la problemon ke jam nun mankas laborlokoj, kaj la registaroj ne sukcesas organizi pliajn. Grava problemo: en multaj landoj mankas familia planado kaj subteno de virinoj mem decidi kiom da infanoj ili povas nutri kaj eduki. Kelkaj religioj opinias ke pli da siaj homoj estas pli bone, ili ne akceptas aktivan familio-planadon, sed nur akceptas la naturan manieron – ekzemple la Papo skribis en sia encikliko „Laudato si ..“ ke nur justa divido estus la plej grava celo. Sed la limigita Tero ne toleras troan kreskadon de unu specio.

Aktuale ni vidas similan problemon en orienta Afriko. En Somalio la nombro da akridoj post la grandaj pluvoj eksplodis, kaj eble ighos danghere por aliaj landoj, char venos dua generacio. Ili formanghas tutajn kampojn. Kaj malfacilas redukti ilin, aparte kiam la registaroj ne interesighas pri la kamparanoj. Sed finfine mankos  greno, milio, ktp.

Kompreneble la kreskokvanto de homoj estas multe pli modera – sed homoj vivas multe pli longe ol akridoj. Sekve de tio ni devas respekti la toleremon de la naturaj kaj socialaj sistemoj. Tion notis la Universala Deklaracio de Homaj Respondecoj (vidu p. 18).

(ambau artikoloj lau Badische Zeitung, 2019-12-21, p. 11):

www.badische-zeitung.de/heuschreckenschwaerme-fressen-felder-kahl--180748683.html

www.badische-zeitung.de/weltbevoelkerung-waechst-weiter--180749451.html

- -

**1997:  Universala Deklaracio de Homaj Respondecoj**

jen, en konciza formo, la 19 artikoloj de chi-tiu Deklaracio, kiu estis verkita de „Interaction Council“ kaj subskribita de multaj elstaraj homoj:

**Fundamentaj principoj de humaneco**

1  Chiu persono devas trakti aliajn personojn humane.

2  Neniu devus subteni mal-humana traktado de aliaj personoj, sed subteni la dignon kaj mem-estimon de aliaj.

3  Neniu persono au organizo, stato, armeo, polico estas super la bono au malbono; por chiuj validas etikaj normoj.

4  La Ora Regulo: kian traktadon vi ne volas mem sperti, tian vi ne donu al aliaj.

**Ne-Perforto kaj Respekto por la Vivo**

5 Neniu rajtas damaghi, torturi au mortigi alian homan personon. Escepte en kazo de necesa memdefendo de individuoj au komunumoj oni rajtus mortigi la atakanton se alia ebleco ne estas videbla.

6 Disputoj (problemoj) inter shtatoj, grupoj au individuoj devus esti solvitaj sen perforto. Neniu registaro devus partopreni en genocido, terorismo, au en misuzo de virinoj, infanoj kaj aliaj civitanoj kiel milito-metodo.

7 Chiu persono estas senfine valora kaj devas esti protektata. Same la bestoj kaj natura medio bezonas protekton. Chiu homo devas protekti la aeron, akvon kaj grundon kio gravas por nunaj kaj estontaj generacioj.

**Justeco kaj Solidareco**

8 Chiu devas agi integre, honeste kaj juste. Neniu persono au grupo devus shteli au depreni la posedon de alia persono au grupo.

9 Chiu kiuj povas, devas klopodi venki malrichecon, malnutradon, ne-sciadon kaj ne-egalecon. Ili devus antauenigi dignecon, liberecon, sekurecon kaj justecon por chiuj.

10 Chiu devas evolui siajn talentojn per diligenta agado; ili devus havi la eblecon al edukado kaj sencoplena laboro. Chiuj devus subteni tiujn kiuj bezonas helpon, la handikapulojn kaj viktimoj de diskriminacio.

11 Chiu proprajho kaj richeco devas esti uzata respondece lau justeco kaj por la avantagho de la homoj.

**Vereco kaj Toleremo**

12 Chiu devas paroli kaj agadi en vereco. Neniu devus mensogi. Chiu devas respekti la privatecon kaj profesian konfidencon. Neniu devas elparoli chion al chiuj chiam.

13 Neniu ( de politikistoj … ghis artistoj, krome kuracistoj …ghis advokatoj ) estas elkrampita de etikaj normoj.

14 La libereco de la publikaj informadaj medioj informi la publikon kaj kritiki instituciojn kaj registarajn agadojn devas esti uzataj per respondeco kaj diskreto. Raportoj devas esti ghustaj kaj veraj. Oni devas eviti raporti sensacie kiu senvalorigas personon.

15 Religia libereco estas garantiata; la religiaj respondeculoj devas eviti paroli malbone pri aliaj religioj. Ili devus rezigni inciti malamon, fanatismon kaj religiajn militojn, sed subteni toleremon kaj reciprokan respekton inter chiuj homoj.

**Reciproka Respekto kaj Partnereco**

16 Chiuj viroj (virichoj) kaj virinoj devas montri respekton kaj komprenemon unu kontrau la alia en ilia partnereco. Neniu devus ekspluati au dependigi alian personon.

17 Geedzeco bezonas amon, lojalecon kaj pardonemon ene de chiuj kulturaj kaj religiaj variecoj, kaj devus celi garantii sekurecon kaj reciprokan subtenon.

18 Familio-planado sensibla estas la devo de chiu paro. La rilaton inter gepatroj kaj gefiloj estu en reciproka amo, respekto, apreco kaj intereso. Nek gepatroj nek aliaj adultoj devus ekspluati, misuzi au mistrakti infanojn.

**Konkludo:** **19** La enhavo de tiu deklaracio estu interpretata en konsento kun la Deklaracio de la Homaj Rajtoj de 1948.

Subskribis pluraj eks-prezidentoj, eksaj chef-ministroj kaj subtenis multaj elstaraj personoj el politiko, civilaj kaj religiaj organizoj. Jen la ligo al la dokumento kiu enhavas la ligon al multaj lingvoj:

www.interactioncouncil.org/publications/universal-declaration-human-responsibilities

-- fino --